# LA JUNA PENSO

SEPTEMBRO 1972 gld. 1.-- **86** VERSCHIJNT 7x PER JAAR

## LA INTERSEKSIO.

Kantata dum la okupado de Maagdenhuis (Virgulinejo), ĉefa administra centro de la universitato de la komunumo Amsterdamo, 1968.
La okupadantoj estis anarkisttendencaj kaj multe uzis nigrajn flagojn.

Kuŝiĝu kune sur la lito.
Damnita estu pruda sfer'.
Kaj restu daŭre la koito,
nur ĝi regadu sur la ter'.
Negeedza estu ĉiu nupto,
sed fiku forte sen kondom'.
Tagnokte daŭru la volupto,
jen la ĉiel' por ĉiu hom'.

Nun al plena orgio,
ni fikadu en rond',
kaj la Interseksio
triumfu en tutmond'!

La vestoj premas la organon.
Prosperas nur la industri'.
Ne plu do kaŝu vian glanon,
nur nuda ja fieras ĝi.
Diskrure servu via piĉo,
sed servu ĝi al ĉiu vir'.
Amase fiku ĝis sufiĉo,
kioma estu la dezir'.

Nun al plena orgio,
ni fikadu en rond',
kaj la Interseksio
triumfu en tutmond'!

Elektu mem vian destinon.
Ne plu do kultu al Onan'.
Virino, prenu vi virinon,
Libere estu vi Lesban'.
Kaj viroj, kuŝu vi ĉe viroj,
se vi volonte faras ĝin.
Nur sekvu vi post la sopiroj.
Nenia estu iam fin'.

Nun al plena orgio,
ni fikadu en rond',
kaj la Interseksio
triumfu en tutmond'!

Rim.Melodio "La Internacio"
La originalon vi povas trovi en:
Jaap van der Merwe,
't Oproer kraait, Bert Bakker,Den Haag 1969
Trad. k-do C.Bruins


LA JUNA PENSO: Leidsevaart 238 , HAARLEM 1502 , Nederlando
pĉk 2 703 131,Bert de Wit , Leidsevaart 52,VOGELENZANG 1556 , NL

# ENHAVO


1 La Interseksio - C. Bruins
2 Enhavo.
Raporto de LJP-KUNVENO dum SAT- kongreso.
SAT-kongreso en Toronto en '73.
Voĉdonilo por la referendumo pri la nova regularo de SAT-Junulfako.
3 Pri SAT-kongreso en Kuopio - Inge Kooij.
4 Vivo de SAT-Junulfako, inkluzivo propono por nova regularo.
5 Kampanjo por transdaŭri - H.J.Grimm.
6/7 Pacista Frakcio
8/9 Klasbatala Rubriko
10/11 Abundana Frakcio
12 Proceso far prokuroro - Zimmermann
13/14 Elekti la sekson de viaj infanoj
15 Pri la malpurigado - Betty Larson
16 Semajnfina renkontiĝo "De Banjaert". Legita.


Pri la enhavo respondecas la verkantoj mem.

statuo apud poŝto-banko en KUOPIO



VOĈDONILO

bonvolu sendi al:
Laŭrence Septier ;1allée des Fougères
93 LE RAINCY ; Francio

☐ por
☐ kontraŭ
☐ sindetene


la novan regularon de SAT-Junulfako.

SAT numero ..............
naskiĝdato ..............
nomo
adreso................ ..............
lando .......... ..........
..............................

## RAPORTO de LJP-KUNVENO dum SAT-KONGRESO

Fakte dum tiu kunveno okazis ne multe, ankaŭ ne multo estis priparolita. La ĉeestintaro ne havis rimarkojn, aŭ kritikojn pri la gazeto, nek sugestojn pri ŝanĝo de aspekto aŭ enhavo, nek ili proponis novajn rubrikojn.
Ŝajnas do ke ni sufiĉe kontentige laboris, aŭ ĉu ni devas konkludi el la silentemo indiferentecon?
Henk van Hulst aludis pri ne ĉiama prizorgado en nederlando, sed estas ankoraŭ tro frue por ion pozitivan diri pri tio.
Ni do daŭrigos nian laboron, esperante ke la abonantoj satigos sin mem per ensendo de verkaĵoj.

inge kooij




aperos en la sekvonta L.J.P.

# toronto 1973

LA SAT-RONDO DE TORONTO, KANADO
invitas vin partopreni
la 46an KONGRESON de SAT
de la 30a de julio ĝis la 5a de aŭg.'73,
sekvotan de semajna postkongreso.

LA SAT-RONDO DE TORONTO, KANADO
malfermas larĝe la brakojn,
por bonvenigi vin;
ni nur petas ke vi alportu
vian entuziasmon kaj kamaradecon.

VENU AL TORONTO,URBO DE L'ESTONTO.

ADRESO: ESPERANTO
P.O. Box 246, Station "F"
Toronto, Ontario, Kanado

* Laŭ la nuna regularo nur tiuj membroj de SAT kiuj ne havas pli ol 30 jarojn havas voĉdonrajton.

# pri SAT-kongreso

*****************************************************************

De la 22a ĝis la 29a de julio okazis en Kuopio, Finnlando la 45a kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda.

Estis por la dua fojo depost sia fondiĝo ke SAT kongresis en Finnlando. La unuan fojon tio okazis en 1958 en Helsinki, al kiu kongreso sin anoncis ĉirkaŭ 250 personoj. Al la ĉi-jara kongreso aliĝis pli ol 350 gek-doj, kvankam la kongresurbo situis eĉ pli norde ol Helsinki; sed verŝajne la pli rapidaj transportiloj kaj la ĝenerale pli bona materia cirkonstanco de la geanoj kaŭzis tiun pli grandan nombron da partoprenintoj.

La kongreso estis bonege organizita de kvar kuraĝuloj de la Kuopia Esperantista Rondo "Lingvoponto". Tiuj kvar gekamaradoj, kun helpo de kelkaj aliaj sukcesis aranĝi bonkvalitan kongreson en kiu ĉiuj kunvenoj kaj ekskursoj marŝis glate.
Ankaŭ laŭ propaganda vidpunkto "Lingvoponto" povas fieri pri la de ĝi organizita kongreso. Ĉiutage aperis en la finna gazeto "Savon Sanomat" rubriko: "Novaĵoj per Esperanto" en kiu resumo de la mondnovaĵoj kaj okazintaĵoj estis legebla en la internacia lingvo. Krome ĝi publikigis (kaj unufoje eĉ sur la frontpaĝo) raporton finnlingvan pri la kongreso.

Dum la laborkunsidoj la diversaj raportoj estis pridiskutataj kaj aprobataj kaj la propono pri pliampleksigo de la Plenum-Komitato de ses al ok personoj estis akceptata.
Cele al memedukiĝo de la anoj okazis kelkaj interesaj prelegoj, inter alie: pri "Simboloj kaj Koloroj" de k-do C. Bruins, pri "Socialpolitiko en Finnlando" de s-ino T.Leivo-Larsson, eksministrino, kaj pri la "Finna Literaturo" de k-do P.Kaikumo.

La frakciaj kunvenoj estis bone vizitataj kaj viglaj.
En kunveno de la pacista frakcio estis pritraktata la temo: "Ĉu solvi sociajn problemojn perforte aŭ ne?". Perforta agado kondukas laŭ iuj al perforta reago, kiel ekz. la agado de la Baader-Meinhof-grupo en Okcident-Germanio, kaj pro tio (sed ne nur pro tio) ĝi ne taŭgas kiel solvo de sociaj problemoj.

Pro artikoloj aperintaj en Sennaciulo de febr.'72 kaj majo'72 pri la signifo de sennaciismo kaj internaciismo por SAT okazis interesa debato en la kunveno de la sennaciista frakcio.
Unuflanke estis eldirata la tezo ke subpremitaj popoloj nur per la stadio de nacio povas veni al sendependeco kaj socialistiĝo, aliflanke oni argumentis ke tio povas validi por nur ankoraŭ subpremitaj landoj sed ke por la okcidenta mondo ne konformas al la bezonoj de la hodiaŭa tempo la stadio de nacio sed nur la sennaciismo. Tiurilate estis rimarkate en la kunveno ke ankaŭ la grandaj mondaj entreprenoj estas organizitaj aŭ laboras ne nur sur nacia nivelo sed sennaciskale.
Ĉe la liberecanoj estiĝis interesa diskuto pri la bazaj konceptoj de anarkismo kaj ĝia praktika utileco.

En la libroservo estis akirebla la nova eldono de SAT: "Infanoj de la Malriĉuloj" de J.A.Lee, tradukita de B.Potts kaj en la stando de La Juna Penso la de ĝi prizorgita broŝuro "El Leteroj" de Lanti.

La diversajn ekskursojn (al Ritoniemi, Heinävesi, kie malaperis restoracio kaj al proksima lago) la kongresanoj intense ĝuis, ankaŭ dank' al la bona vetero. La tranoktejoj kaj manĝaĵoj kontentigis ĉiujn.

Por la 46a kongreso de SAT la anojn invitis la SAT-rondo de Toronto, Kanado de la 30a de julio ĝis la 6a de aŭgusto '73a.


inge kooij



urbdomo de KUOPIO

# Vivo de SAT Junulfako

La junulfako de SAT kunvenis okaze de la kongreso la 28an de julio . K-do Jimmy Riviere prezidis la kunvenon . Kiel decidita dum la SAT-JF renkontiĝo en NEMOURS, la ĉefa afero pridiskutita dum ĉi tiu kunveno estis la projekto pri nova regularo de "JUNUL-FAKO DE SAT" . Ni ellaboris la referendumotan tekston laŭ 3 proponoj :




LJP: interesa por ĉiu.

- la malnova regularo ;
- la propono de Kribo ;
- la propono de la Provizora Komitato .

NOVA TEKSTO DE LA REGULARO
de
SAT - JUNULFAKO

1) Ni estas junulfako de SAT kaj adoptas la regulojn de tiu movado ;

2) Nia ĉefa celo estas disvastigi la sennaciecajn konceptojn de SAT en junularaj medioj kaj organizi la junularan aktivecon en la kadro de SAT ;

3) Povas esti ano de SAT - JUNULFAKO ĉiu SAT - ano ne pli aĝa ol 35 jara ;

4) La ligilo de JF estas la JF - Komitato kiu konsistas el minimume tri membroj , elektitaj dum la jarkunsido de la JF . Tiuj membroj devas esti povantaj facile kunveni. Unu el ili estas la sekretario kaj lia adreso estas tiu de la JF ; JF - Komitato eldonas informilon kiu aperas ĉiun duan monaton en la Komuna Bulteno (L.J.P.) sub la nomo "VIVO DE LA SAT-JF" ;

5) La kotizo estas libervola ek de minimumo fiksata de la perantoj de JF en interkonsento kun JFK .

6) Dum la jarkunsido de JF , kiu okazas en la kadro de SAT -Kongreso, JF :
- pridiskutas la sintenon de JF- Komitato ;
- elektas eventualajn novajn JF-Komitatanojn ;
- esprimas sin pri la agado en la venonta jaro;

JFK kaj la JF - anoj de la urbo respondecas pri la organizado de la jarkunsido;

7) Krom tiu dumkongresa kunsido , povas okazi ankaŭ aliaj JF-kunvenoj je aliaj lokoj kaj datoj . Tiuj kunvenoj povas servi por pridiskuti ĉiujn aspektojn de JF - aktiveco, sed ne havas decidrajton ;

8) Unu monaton antaŭ la JF- renkontiĝo, JFK publikigas ĉiujn raportojn pri sia laboro en la informilo. Du monatojn antaŭ la jarkunsido , proponoj por la jarkunsido aperu en la informilo ;

9) La landaj perantoj de JF informas pri la laboro de la JFanoj en siaj landoj kaj funkcias kiel landaj kasistoj. Ili raportas al JF-komitato se necesas pri la aktiveco de sia landa anaro, minimume unufoje jare ;

10) En ĉiu urbo kie eblas, ekzistu urba peranto aŭ urba komitato elektita de la JF-anoj de la urbo . Li (ŝi) organizas la lokajn aktivecojn ;

11) Ŝanĝo de la regularo de JF povas okazi nur per referendumo : 2/3 a plimulto de la donitaj voĉoj necesas . Referendumo okazas cetere en ĉiuj kazoj,kiam la Jarkunsido postulas tion. Pri ĉiuj aliaj aferoj decidas la Jarkunsido.Voĉdonrajton havas ĉiu JFano kiu plenumis sian financan devon ..

PRI LA MOVADO:

Hans J GRIMM

# KAMPANJO POR TRANSDAŬRI

(la tre baldaŭ ĝeneralan kolapson de l' nuna reg-sistemo)

---

En majo 1969 startis en Anglujo movado simila al la franco "Batalo por la homo". Sed la unue menciita nun jam laboras en pli ol 100 landoj. Temas do pri agado, kiu meritas nian atenton jam pro sia sukceso.
Kontraŭe al la jam 10 jarojn ekzistanta "Mondunuiĝo por protektado de l' vivo", (Aŭstria fondinto), ĉi tie ne temas pri unuiĝo de ĉefe fakuloj, sed pri agado *de ordinaraj civitanoj , de ĉiu ajn.*

Fakte ĝi ne estas unuiĝo. Ĝi estas internacia movado sen organiza strukturo, sen gvid-komitato. Do ĝi ankaŭ ne postulas membrokotizon.
La kapitalon necesan por kontaktigi simpatiantojn - eĉ en orientblokaj landoj - elspezas la ĵurnalisto Tony Mills, iama eldonisto de la ĵurnalo "Moderna angla lingvo". Ĝis nun li elpoŝigis 3700 pundojn (anglajn), - 600 li rericevis per vendo de traktatoj -.

Unue li alparolis la publikon ĝenerale per gazetanoncoj. Nun ne plu necesas tiaj elspezoj; nun ĉiu nova simpatianto atentigas siavice plurajn novajn.
Se la ŝparmono de Tony Mills elĉerpiĝus, li alvokos la simpatiantojn donaci unufoje kiel eble plej grandan monsumon por iniciati duan kampanj-etapon; la simpatiantoj de l' nova etapo financos la trian ktp.

Atenton meritas krom la strukturo de la agado, la plej moderna senorganiza, kaj ties financa flanko, ankaŭ la agado mem: nome krom varbado de novaj simpatiantoj por la eldonaĵoj kaj la "Novaj-letero"-j, kiun cetere ricevas ĉiu simpatianto, temas nur pri u n u celo:
oni atentigas la ĝisnunajn politikistojn, ke iliaj pozicioj ŝanceliĝos, ke rapidege kreskanta nombro da simpatiantoj balotos malfavore por ili kaj tre favore por la konkuranto, se ili ne unuavice konsideros la postulojn de la kampanjo.
La fina celo de ĉiuj kampanj-etapoj estas investi mondregistaron, kiu konsideras nur aferojn rilate konservadon de la vivbezonaĵoj, de la bazoj de la simbiozo de ĉiuj estaĵoj.

Pro la malkontenteco de la balotantoj, la nuna politika situacio ĉiam pli kaj pli montras la malefikon de la nunaj registaroj. Baldaŭ nur 50 procentoj de la civitanoj balotos. Do se la kampanjo povos gajni pliajn 1 - 2 procentojn, ĝi havos decidan influon. Tio eblos, ĉar la kampanjo ja ne estas politika partio kiu volas havigi al siaj anoj postenojn. Ĝi ja nur volas plenumi la volon de la balotantoj, nome ke elektitaj estu nur tiuj politikistoj, kiuj ne kandidatiĝas pro persona profito.

Do ĉi tie ne eblas opinidiferencoj, pri kiuj povus interdisputadi fakuloj senfine, sed temas pri ekstreme simpla agdo -, cetere tute laŭleĝe demokrata - por renversi la nunan reg-sistemon. Ĝis nun la establitaj fortoj povis ordoni kion ajn konsumu kaj faru la amasoj, spite la ankoraŭ ne kontentige funkciantaj demokratiaj instancoj. Estontece la unuigotaj amasoj toleros nur tiujn gvidantojn, kiuj strikte plenumos ordonojn, difinitaj nek de la deziregoj de la amasoj, nek de la teoriaĵoj de fakuloj, sed - meze en la totala krizo de la homa gento - de la kondiĉoj de la transdaŭro mem.

La legantoj certe miros, kial mi ne citis el la traktaĵoj mem. Sed ties enhavo estas tiom trafa, tiom ĝenerale komprenebla, ke komence oni hezitas kredi kaj daŭre serĉas iun eblan kaŝitan blufon. Do plej bone ĉiu trastudu ilin mem.

La UEA-kongresanoj en Londono (ĉirkaŭ 2000) jam ricevis esperanto tradukon, kune kun la kongresdokumentoj. Sed mi opinias ke la tekstoj ne nur estas interesaj por kelkaj kongresanoj, sed por ĉiu SAT-ano. La kampanjo estas grava, agadon inspira iniciato. Mi do proponas ke por ŝpari afrankon kaj por Tony Mills, kaj por ni, la redaktoroj de Sennaciulo kaj LJP mendu la bezonatan kvanton da senkostaj ekzempleroj kaj aldonu ilin al la venonta numero.
Adreso: Q (Tony Mills), 65 Artesian Road, London W2 5DB, Anglio.

# PACISTA FRAKCIO

RAPORTO DE LA FRAKCIA KUNVENO DUM LA SAT-KONGRESO EN KUOPIO, FINNLANDO

Corrie Kooij

Ĉeestis la frakcia kunveno ĉirkaŭ 80 personoj, al kiuj estis donitaj la broŝuroj: Historia kaj filozofia fono de la moderna pacifismo, de Harold Bing (eldono de Internacio de Militrezistantoj), kaj Ĉu neperforta revolucio aŭ revolucia liberiga milito? de Teodoro Ebert (eldono de la Pacista Frakcio de SAT).

K-do Kunze prezidis la kunvenon kaj anstataŭis per tio kdon Schneller, la respondeculo de la Pacista Frakcio, kiu kiel militrezistanto denove eniros la karceron (por 5 monatoj), post kio li estos eksigata de la militservo. Al li kaj al kdo Rofo la ĉeestintaro sendis mesaĝon.

Kdo Kunze voĉlegis la celojn de la Pacista Frakcio, kiel ili estas publikigitaj sur la lasta paĝo de la broŝuro de Teodoro Ebert, nome:

- studi, malkovri kaj disfamigi la kialojn de milito, esplori la rimedojn kontraŭajn kaj utiligi ilin por kiel eble plej faciligi la kontraŭmilitan taskon en la kadro de SAT.
- meti Esperanton je la servo de la pacistaj organizoj neesperantistaj por tiel helpi ilin.
- disvastigi Esperanton en la pacaj medioj.
- instigi la anojn al agado per ties klerigado.
- se eble, eldoni bultenon.

La anoj akceptis la raporton de la Pacista Frakcio, verkita de kdo Schneller (vidu paĝon 7 de ĉi tiu numero).

* * * * * * * * * * * *



Kdo Kunze enkondukis la diskuttemon de la kunveno: ĈU SOLVI SOCIAJN PROBLEMOJN PERFORTE AŬ NE?

Ekzistas neniu kontentiga socia kaj ekonomia sistemo, ĉar en neniu sistemo la homo estas konsiderata la cemtron. Kontraŭe, li estas ekspluatata kaj dependa, tiel en la oriento kiel en la okcidento. La regantaj aparatoj estas burokrataj, pro kio estiĝas konfliktoj. La establitoj volas teni la potencon, kontraŭataj ĉefe de junuloj/studentoj. La demando ne plu estas KIAL sed KIEL forigi la maljustecon: perforte aŭ ne.

Jen kelkaj citaĵoj el la broŝuro de Teodoro Ebert pri ĉi tiu temo:
Lin Biaŭ, ministro de l' Ĉinia Defendo konsideras la batalmetodon per geriloj "spirita atombombo, kiu, en la manoj de l' revolucia popolo, konsistigas multe pli potencan kaj utilan armilon ol estas la fizika atombombo".
Martin Luther King esperas ke, "la neperforta agado, kiun ekuzis la nigruloj en sia malespera situacio, fariĝos la respondo al la plej urĝa bezono de l' homaro".
Kaj Gandhi la ĉefa reprezentanto de la neperforto sukcese uzis tiun metodon en Hindio
Ankaŭ en la Tria Mondo regis kaj ankoraŭ vaste regas skeptiko pri la metodo de gerilo. Depost 1966 eble malpli, sed ankaŭ tie restas ŝanco ekuzi neperfortajn luktoprocedojn.
Kame N'Krumah komence ne povis imagi ke la filozofio de neperforta rezistado de Gandhi havas ian sukceseblon, sed poste komprenis ke ĝi povos konduki al solvo de la kolonia problemo

"Ju pli da perforto, des malpli da revolucio".
Tiun aserton pruvas la sekvoj de la agoj de la Baader-Meinhof-grupo en Germanio. Per gerilaj agoj ĝi provis interesi la gejunulojn kontraŭbatali maljustaĵojn, sed atingis ke ĉiuj gazetoj kaj la publika opinio estis ne favoraj al ili, sed pli grava estas, ke el ĝiaj agadoj plirapida pligrandigo de la policistaro.

Neperforto povas esti utila subteno de postuloj pri justeco, se mankas demokratiaj vojoj, aŭ se tiuj estas tro mallarĝaj.
Konklude: neperforto, kaj ne perforto!!
Poste sekvis diskuto pri ĉi tiu temo.

* * * * * * * * * * * *

**Kontaktadreso:**

Kdo R. Schneller
3 av. de Rosemont
CH 1208 Ĝenevo



## RAPORTO 1971/72

**Jen informcele kelkaj notoj rilate la laboron de la frakcio dum la pasinta jaro** (por la k-doj ne povintaj ĉeesti la kunvenon en Kuopio):

- Eldono de la broŝuro "Ĉu neperforta revolucio aŭ revolucia liberiga milito?", verkita de Teodoro Ebert kaj tradukita de kdo Baudé, kiu prizorgis ankaŭ ĝian multobligadon.
- Paĝo de la Pacista Frakcio en La Juna Penso. Kelkaj kdoj kunhelpis per artikoloj. Dankon! Tiu paĝo, kies stencilojn tajpas kdo Baudé, regule aperas ekde januaro 1971. Por plivariigi la enhavon de tiu paĝo necesus ankaŭ viaj kontribuaĵoj. Vi esprimu vian opinion pri paco, milito, konfliktoj, neperforto, ktp. Volonte ili estos publikigataj.
- Komunikoj en S'ulo. Laŭ bezono aperis komunikoj de la P.F. en S'ulo. Sekve de tiuj komunikoj aliĝis kvin kdoj kaj kelkaj aliaj mendis broŝuron aŭ pagis kotizon.
- Korespondado. Pere de la SAT-sidejo ni ricevis la manuskripton "Manifesto de la paco" tradukitan de A. Mosch, kiu petas ĝian publikigon. Tio ne eblas, ĉar necesus tro da lingvaj korektoj, ne parolante pri la enhavo, kiu estas parte tro religieca. Danke ni ricevis leterojn de kdoj el diversaj landoj.
- Proponoj. Kdo el Ĉeĥoslovakio proponas, mi citas: " tradukon de diversaj opinioj de verkistoj, politikistoj, sciencistoj, artistoj ktp. pri milito, simile al la broŝuro pri e-o. Sed tio ĉi postulus pli da kunlaborantoj, por ke oni ĉiam traduku el la originala lingvo". Ni do serĉas tradukemajn kdojn kaj tradukindajn citaĵojn. Interesemuloj rilatu kun la sekretario.
- Kasraporto: Bilanco por la periodo 1.7.71 – 1.7.72 (sv.fr.)

| Aktivo | | Pasivo | |
|---|---|---|---|
| Kaso | 166.-- | Presado de broŝuroj | 41.60 |
| Kotizoj kaj donacoj | 68,70 | Afrankoj | 10.-- |
| Vendo de broŝ. en Narbonne | 27,30 | | |
| | 262.-- | | 51.60 |

Havaĵo 1.7.72 : 210.40

## MONTEGOJ gravediĝis MUSETO naskiĝis

Dum 30 monatoj militistaj fakuloj el Sovetunio kaj Usono de tempo al tempo en Helsinki kaj Vieno kunvenis. Nome de siaj registaroj ili havis la taskon serĉi vojon por limigi la senfinan raket-kontraŭraket-, kontraŭ-kontraŭraket-armadon en la du ŝtatoj. Ne estas sekreto, ke ne pacamo, sed la timige altaj kostoj estis la kaŭzoj de tiuj intertraktoj.

En majo '72 "la du plej potencaj viroj en la mondo" – Breŝnjev kaj Nikson – en Moskvo subskribis kontrakton, en kiu troviĝas la rezulto de la tridekmonataj fakul-interparoladoj. La t.n. SALT-Kontrakto antaŭvidas ĉefe limigon de la "strategia armado". Ĉiu de la du ŝtatoj ne posedu pli ol 200 pafbazojn por raket-defendraketoj. Plue dum la venontaj 5 jaroj ne plialtiĝu la nombro da interkontinentaj ofensivaj atomarmilbazoj, al kiuj apartenas ankaŭ la submarŝipoj. Tamen ambaŭ ŝtatoj havas la rajton modernigi siajn ofensivarmilojn laŭ la teknologia progreso. Do, kvanta limigo, sed la luktado por "kvalito" daŭradas. Des pli facile, konsenti la kvantan limigon, ĉar la nuna kvanto de detruiloj atomaj sufiĉas, plurfoje neniigi la homaron.

Mi tre dubas, ĉu la kontrakto havos iun ajn praktikan valoron. Eĉ ne sukceson financan, ĉar ĝuste la esplorado kaj la kreado de novaj armiloj de "pli bona kvalito" kostas sumegojn. Mian dubon pruvas la fakto, ke antaŭ kelkaj tagoj la usona defendministerio postulis pli da mono.

Ni do sobre rigardu la okazaĵojn!

Ni evitu ricevi sablon en la okulojn, eĉ se la reklamo estas bombasta!

La pli ol 200 miliardoj da usonaj dolaroj, kiuj elspeziĝis en '71 en la mondo por armado, ĉiutage memorigu nin pri la danĝero, en kiu ni vivas. Tiu skandala malŝparo de mono, kiun la popoloj pagas kaj kiu estas uzata por la malbono de tiuj samaj popoloj, estas pli ol krimo, kion ni montru ĉiutage kaj ĉiuokaze.

K.

**Kontaktadreso:**
Kdo R. Schneller
3 av. de Rosemont
CH 1208 Ĝenevo

# Rubriko de Pacista Frakcio

## RAPORTO 1971/72

**Jen informcele kelkaj notoj rilate la laboron de la frakcio dum la pasinta jaro** (por la k-doj ne povintaj ĉeesti la kunvenon en Kuopio):

- Eldono de la broŝuro "Ĉu neperforta revolucio aŭ revolucia liberiga milito?", verkita de Teodoro Ebert kaj tradukita de kdo Baudé, kiu prizorgis ankaŭ ĝian multobligadon.
- Paĝo de la Pacista Frakcio en La Juna Penso. Kelkaj kdoj kunhelpis per artikoloj. Dankon! Tiu paĝo, kies stencilojn tajpas kdo Baudé, regule aperas ekde januaro 1971. Por plivariigi la enhavon de tiu paĝo necesus ankaŭ viaj kontribuaĵoj. Vi esprimu vian opinion pri paco, milito, konfliktoj, neperforto, ktp. Volonte ili estos publikigataj.
- Komunikoj en S'ulo. Laŭ bezono aperis komunikoj de la P.F. en S'ulo. Sekve de tiuj komunikoj aliĝis kvin kdoj kaj kelkaj aliaj mendis broŝuron aŭ pagis kotizon.
- Korespondado. Pere de la SAT-sidejo ni ricevis la manuskripton "Manifesto de la paco" tradukitan de A. Mosch, kiu petas ĝian publikigon. Tio ne eblas, ĉar necesus tro da lingvaj korektoj, ne parolante pri la enhavo, kiu estas parte tro religieca. Danke ni ricevis leterojn de kdoj el diversaj landoj.
- Proponoj. Kdo el Ĉeĥoslovakio proponas, mi citas: " tradukon de diversaj opinioj de verkistoj, politikistoj, sciencistoj, artistoj ktp. pri milito, simile al la broŝuro pri e-o. Sed tio ĉi postulus pli da kunlaborantoj, por ke oni ĉiam traduku el la originala lingvo". Ni do serĉas tradukemajn kdojn kaj tradukindajn citaĵojn. Interesemuloj rilatu kun la sekretario.
- Kasraporto: Bilanco por la periodo 1.7.71 – 1.7.72 (sv.fr.)

| | | | |
|---|---|---|---|
| Aktivo Kaso | 166.-- | Pasivo. Presado de broŝuroj | 41.60 |
| Kotizoj kaj donacoj | 68,70 | Afrankoj | 10.-- |
| Vendo de broŝ. en Narbonne | 27,30 | | |
| | 262.-- | | 51.60 |

Havaĵo 1.7.72 : 210.40

## MONTEGOJ gravediĝis MUSETO naskiĝis

Dum 30 monatoj militistaj fakuloj el Sovetunio kaj Usono de tempo al tempo en Helsinki kaj Vieno kunvenis. Nome de siaj registaroj ili havis la taskon serĉi vojon por limigi la senfinan raket-kontraŭraket-, kontraŭ-kontraŭraket-armadon en la du ŝtatoj. Ne estas sekreto, ke ne pacamo, sed la timige altaj kostoj estis la kaŭzoj de tiuj intertraktoj.

En majo '72 "la du plej potencaj viroj en la mondo" – Breŝnjev kaj Nikson – en Moskvo subskribis kontrakton, en kiu troviĝas la rezulto de la tridekmonataj fakul-interparoladoj. La t.n. SALT-Kontrakto antaŭvidas ĉefe limigon de la "strategia armado". Ĉiu de la du ŝtatoj ne posedu pli ol 200 pafbazojn por raket-defendraketoj. Plue dum la venontaj 5 jaroj ne plialtiĝu la nombro da interkontinentaj ofensivaj atomarmilbazoj, al kiuj apartenas ankaŭ la submarŝipoj. Tamen ambaŭ ŝtatoj havas la rajton modernigi siajn ofensivarmilojn laŭ la teknologia progreso. Do, kvanta limigo, sed la luktado por "kvalito" daŭradas. Des pli facile, konsenti la kvantan limigon, ĉar la nuna kvanto de detruiloj atomaj sufiĉas, plurfoje neniigi la homaron.

Mi tre dubas, ĉu la kontrakto havos iun ajn praktikan valoron. Eĉ ne sukceson financan, ĉar ĝuste la esplorado kaj la kreado de novaj armiloj de "pli bona kvalito" kostas sumegojn. Mian dubon pruvas la fakto, ke antaŭ kelkaj tagoj la usona defendministerio postulis pli da mono.

Ni do sobre rigardu la okazaĵojn!


Ni evitu ricevi sablon en la okulojn, eĉ se la reklamo estas bombasta!

La pli ol 200 miliardoj da usonaj dolaroj, kiuj elspeziĝis en '71 en la mondo por armado, ĉiutage memorigu nin pri la danĝero, en kiu ni vivas. Tiu skandala malŝparo de mono, kiun la popoloj pagas kaj kiu estas uzata por la malbono de tiuj samaj popoloj, estas pli ol krimo, kion ni montru ĉiutage kaj ĉiuokaze.

K.

# KLASBATALO

Rubrikresponsas:
Gekdoj Ribas
12 rue Cave d'Igoire
F 45190 Beaugency




## PRI BANALA STRIKO

Vendrede 3an de junio ĉiu laboristo en mia uzino ricevis de la sindikato C.G.T. flugfolion, sur kiu oni povis legi: "La 5an de junio C.G.T. invitas vin partopreni en avert-striko de du horoj...

"Estas skandalo, ke en la nuntempa Francio laùdire riĉa kaj moderna, pli ol 6 milionoj da gelaboristoj estas devigataj streĉe vivi per salajro malsupera al 1000 frankoj monate...

"Nia unua postulo estas, ke ne plu ekzistu salajro malsupera al 1000 frankoj monate, surbaze de 40 laborhoroj semajne."

Sed tiu anoncita avert-striko ne okazis, ĉar intertempe estis kontrakto inter la uzina estraro kaj la laborista delegitaro; laù tiu kontrakto la estraro akceptis altigi la salajron de la plej malalta laborista kategorio, t.e. O.S.1, ĝis 1000 frankoj monate surbaze de 40 labor-horoj semajne. Tiu altigo devus okazi en tri fojoj: 1an de julio altiĝo al 941 frankoj, 1an de aùgusto al 962 f, 1an de novembro al 981 f. kaj 1an de januaro 1973: 1000 frankoj.

Tamen la 7an de junio C.G.T invitis al nacia striko por atingi, ke la minimuma salajro estu 1000 frankoj kaj ke la pensiiĝo estu je 60 jaroj. (La CGT-sindikato de l'uzino al nur unuhora striko kiel solidaro al la aliaj gelaboristoj). Tiu striko okazis kun partopreno de 87% de la laboristaro.

Denove la 22an de junio oni distribuis flugfolion de la sama sindikato, kiu diris la jenon: "La CGT-estraro plene apogas la decidon de la nacia estraro fari el la 23a agadtagon kiel logikan sekvon de la agadoj faritaj dum pluraj monatoj por ekhavi la rajton emeritiĝi je 60 jaroj kun deca pensio de minimume 600 frankoj monate. Tiel ni invitas vin striki dum du horoj la 23an de junio." . La partopreno al tiu striko estis malsupera al 60%.

Sed nenia flugfolio ja diris, ke tiu kampanjon havis politikan fundon aù bazon. La komunista partio deziras akiri pliajn adeptojn kaj simpatiantojn por havi favoran pozicion en la venonta jaro dum la elekto de novaj deputitoj. Tiel ili ekpensis tiun agadkampanjon, kiun kompreneble devis efektivigi C.G.T, ĉar ĉiu scias ke C.G.T estas komunist-tendenca kaj ke parto de la kotizoj pagitaj de la sindikatanoj iras al la kaso de la komunista partio.

ODDINO

## FAKENAHM : tute alia striko ..!

La striko en Fakenahm (en Norfolka regiono, Britio) indas la raporton. Temas pri eta ŝu-uzino, laboriganta 39 virinojn kaj minacata je malapero.

La virinoj okupis la uzinon kun siaj gefiloj kaj metis sur la pordon la saman standardon, kiel faris la laboristoj de Fisher-Bendix: "Under new Management" (Sub nova mastrado).

Post kelka tempo ili ekpensis utiligi la maŝinojn kaj la stokitan ledon por fari alion ol ŝuaĉojn. Ili fabrikis tion, kio plaĉis al ili: sakojn, zonojn, kaj el stoko da malnovaj feloj ili faris jakojn kaj jupojn. Ili anoncis, ke ili povas produkti laùpete kaj ili disvendis siajn produktojn kvarone de la normala prezo. Neutilas diri, ke tiukaze ne mankas la mendantoj...

(daùrigo sekvontpaĝe)

Fakenahm (daŭrigo)

Ĝua parentezo: Aliaj industriistoj proponis al la Fakenahm-posedantoj reaĉeti la uzinon por daŭrigi la fabrikadon organizatan de l' laboristinoj.

Poste, 19 inoj daŭrigis la okupado-produktadon". Tio ne starigis organiz-problemojn. Pro la etnombro da laboristinoj, unuanura sukcese plenumas la koordinadon.

La loĝantaro kaj la gazetaro sekvis tiun aferon kun pli malpli admira simpatio,kvazaŭ ili ne konsciis pri ties reala signifo, aŭ eble tial ke tiu agmaniero respondas al nekonscia, profunda emo...ĉe ĉiuj, kiuj ne estas mastroj, kompreneble!

Sed...tiaj agadoj povas tiel okazi, ĉar favoras ilin la socia kunteksto, aŭ,se oni preferas, la klasa solidareco. La Fakenahm-mastroj provis elŝaltigi la elektron kaj la telefonon.La laboristoj, kiujn oni komisiis fari tiun aĉan laboron, estis akceptitaj de la virinoj, kiuj klarigis kial kaj kiel ili batalas. La uloj reiris, ne plenuminte la ordonojn de siaj estroj...

Ni aldonu, ke la sindikatoj vigle kondamnis la agadon de la Fakenahm-laboristinoj... Ĉu necesas komentoj???

El "La Nemortigebla Anarkismo",KB

""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""

## K A R A K T E R I Z A Ĵ O J de M E M M A S T R U M A S T R I K O

(el la sama gazeto)

Tia striko ne estas memmastrumado. Ĉar ĝi okazas interne de la kapitalisma socio, ĝi povos daŭri nur kelkajn tagojn. Poste,ĉar ili ne plu toleros la pruvon, ke oni povas vivi sen ili, la Mastro, la Prezidanto-Direktoro aŭ la Ŝtato sendos sian klabpolicon. Tio estas logika. Sed ĉefas, ke en deko da tagoj la laboristoj lernos ege pli ol en tridek jaroj da disciplinita sindikatana vivo.

Al tiuj logikaj malamikoj aldoniĝas la profesiaj sindikatistoj, kiuj, ofenditaj konstati, ke ili ne plu estas aŭskultataj estretoj, ne hezitos malnoble kondamni tiun luktomanieron (vd. Fakenahm!) Sed tiu dua obstaklo estos venkita, se la laboristoj klarigas sian lukton ne nur interne sed ankaŭ ekstere de l'uzino. Tiam ili ricevos neatenditajn kaj efikajn subtenojn (elektristoj en Fakenahm, nutraĵportantaj kamparanoj, alikorporaciaj laboristoj por fortigi la strikpostenojn aliloke...)

Kiel ekokazas tia striko? Kion faras la laboristoj ?

Komence oni okupas la laborejon, do la maŝinojn. Poste oni decidas ekfunkciigi la produktilojn. Ĝis elĉerpiĝo de l'stokoj.Sed estas kompreneble, ke ne temas produkti por la plezuro produkti, sed precipe lerni mastrumi la entreprenon. Tial la produktado povas esti eta. Forlasante siajn maŝinojn,la laboristoj emas iri al la konsil-kunveno por pripensi, sugesti, fronti la problemojn. Ni ne forgesu, ke temas pri periodo kiam necesas lerni kaj solvi rapide.

Lerni mastrumi, jen la ĉefa afero. Kun aŭ sen kadruloj. Kun, tio estas pli facila.Sen, oni tamen sukcesas: kadro, estas ofico, el kiu oni forpelas la laboristojn, kredigante al ili, ke ili tro stultas por plenumi ĝin. Nenio pli bona ol mastruma striko por refuti tion!

La kalkulo de la reala kosto de la produktita varo ebligas, se ekzistas loka vendebleco, grandsukcesan disvendadon. Sed se la problemo de la nutrado de l'laboristoj estas solvata per la kamparana subteno, tiam povas okazi senpaga disdonado de l'produktoj.

Ĉion ĉi la laboristoj decidas mem. Ĉar ili perfekte organiziĝas por la diskutado kaj por la decidado!

Ekde la komenco de la lukto, la laboristoj alvokas por diskuto

- en la liberaj konsilantaroj laŭ laborfakoj;
- en la liberaj ĝeneralaj asembleoj, kunvokitaj ĉiufoje kiam stariĝas problemoj por la tuta entrepreno.

Estas okaze de tiaj kunvenoj kaj asembleoj ke la memmastrum-strikantaj laboristoj forĝis la sukceson de sia lukto.

Estas okaze de tiaj kunvenoj kaj asembleoj ke la hispanaj laboristoj en 1936 organizis la vivon de la agraraj kaj industriaj kolektivoj.

.... Preni la maŝinojn, kial ?

- ĉar ĉiu striko, kiu ne celas eksproprietigi (eĉ etdaŭre) la Mastron aŭ la Ŝtaton, estas nur infana kaprico, tolerata de l'ekspluatantoj kaj agnoskita de la leĝo (kondiĉe ke oni antaŭavertu!)

.... Mastrumi la uzinon, kial ?

- ne por resti tiel mizera sen mastro aŭ sen ŝtato, kiel kun ili, sed por aboli la sklavecon. Ne forgesi detrui ankaŭ la ŝtaton. Kial? Demandu la laboristojn de orientaj, t.n. socialismaj landoj!

"""""""""""""""""""""""""""""" Provizu ĉi rubrikon per viaj propraj kontribuaĵoj!... """"""""""""""""""""""""""""""

BULTENO DE Abundana Frakcio en S.A.T. Nº 26,Sept.1972

Sekretario: Kdo H. KOTRO, 6 Chemin Vert, F 28240 LA LOUPE (Francio)
Frakcia kotizo: laŭvola, utilas por aperigi broŝurojn laŭ la disponebla mono kaj la sugestojn de l' frakcianoj. Poŝtkonto: H. KOTRO, 3891-24 Paris

Karaj Gekamaradoj, jen reago subskribita de Kdo Petro:

IOM PRI LA ABUNDISMO.

" Komence de la tridekaj jaroj aperis libro de Juljo Baghy kun la titolo "Verdaj Don Kiĥotoj. La libro enhavas aron da noveloj, personaĵoj pri la naivaj fantaziaj ideoj, kiujn havas diversaj esperantistoj, kiuj kredas esti trovintaj la plej ĝustajn agadmetodojn kaj por esperanto kaj por la mondsavo. Inter ili troviĝas ankaŭ unu homo, kiu volas formi asocion M O R T. La koncerna homo estas masaĝisto kaj li volas organizi la homojn de sia metio en asocio sub la nomo Masaĝista Organizo Revolucia Tutmonda. Post la unua mondmilito oni do vivis en la revolucia romantiko kaj, ke revolucio estu tutmonda estas do klare por ĉiu revoluciulo kaj por ĉiu esperantisto precipe.

" Leginte en Sennaciulo la notojn de Kotro pri abundismo, min interesis scii kio estas tiu propagita genia ĉiopova kaj ĉiokapabla abundismo por solvi ĉiujn problemojn en la mondo. En unu noto Kotro eĉ skribis, ke por la homaro ekzistas la elekto, aŭ realigi la abundismon,aŭ perei pro la atombomboj. Vere, ke leginte tiujn menciitajn du elektojn mi estis iom skeptika pri la seriozeco en tiu savrimedo kontraŭ la atombomboj, sed oni do povas havigi almenaŭ iom da informoj pri tiu abundismo. Kaj mi akiris pri la abundismo iom da literaturo, nun mi povas pri la abundismo informi iom pli. Do,mi akiris du foliojn en granda formato, unu folio estas de ab. frakcio ĉe UEA kaj unu folio estas de frakcio ĉe SAT. La enhavo en ambaŭ folioj estas principe la sama, pri multaj aferoj plejparte ekonomiaj, kiuj estas malbonaj kaj kiel devus esti, por ke estu ĉio en la mondo bona. Ekz. "Por ke la ekonomio en la mondo estu bona, la maŝinoj devas konstante labori kaj la produktitaj varoj devas esti disdonitaj al ĉiuj homoj ilin bezonantaj sen uzado de mono" kaj simile. Sed kiu disdono ? kiu gardu la maŝinojn ? kiel aranĝi la produktaparaton? Nu jes, estus tro multe atendi ian konkretan proponon, aŭ ideon de naivaj fantaziuloj. Krome, mi havis tekon da "Dokumentoj", tiuj "dokumentoj" estas artikoloj esperantigitaj de francaj gazetoj de la kvardekaj jaroj pri aferoj ekonomiaj kaj kompreneble aferoj tre malbonaj. Sed gazetartikoloj povas esti uzataj kiel propaganda materialo, sed nenion plu. Per la samaj artikoloj oni do povas propagandi ĉion ajn,eĉ se la enhavo en la artikoloj konformas al la vero.

" Kaj fine, la ĉefa filozofia, aŭ eble "scienca" verko pri la abundismo, la libro de Eduard Belami "Rigardante malantaŭen". Tiu libro estis verkita en la okdekaj jaroj de la dekoka jarcento, kiam la socialistaj ideoj estis revoj kaj utopioj. Por utopia rakonto tiu verko taŭgis, sed por praktika utiligo iun ideon estas necesa io pli ol nura utopio. Kia do estas la enhavo en tiu libro ? El la ĉirkaŭ ducent paĝoj de tiu libro (mi ne havas ĝin ĉemane kaj mi ne memoras ekzakte) mi tralegis ĉirkaŭ kvardek paĝojn kaj mi opiniis tion sufiĉa, la ceterajn paĝojn mi trafoliumis kaj mi konstatis, ke la daŭrigo en tiu libro estas nur ripetado de la sama afero, kiun mi jam sciis. Krome, mia kono de la esperanta lingvo estas apenaŭ elementa, sed la libro "Rigardante malantaŭen" en la lingva senco estas je tia karaktero,ke mi povis ĝin kompreni dank'al la scio, en certa grado, de la lingvo nacia el kiu tiu libro estis esperantigita.

" La rakonto en tiu libro estas jena: En iu urbo en Usono vivas la plej granda parto de la loĝantaro en mizero kaj kelkaj vivas en komforto. Juna knabo kaj knabino de riĉaj familioj sin preparas al sia geedziĝo. Interalie ili jam havas aranĝitan por si loĝdometon, kiu ankaŭ havas kelon. Subite okazis io, en la senco de naturkatastrofo, ĝuste tiam kiam la junulo estis en la kelo. La domoj en la urbo disfalis kaj ankaŭ la dometo, kiu devis esti la loĝejo por la juna geo. La fianĉo restis vivanta en tiu katastrofo dank'al tio, ke li estis en la kelo. Eliri el tiu kelo li ne povis, li estis kovrita de la amaso de la disfalintaj domoj. En tiu kelo estis abunda provizo da manĝaĵo kaj la junulo vivis dum kelkaj jaroj en la kelo sen iu eblo doni iun signon pri sia ekzistado. Iun fojon oni komencis forigi la rubaĵon

super kaj ĉirkaŭ la kelo por iu nova konstruaĵo kaj dank'al la fosado ankaŭ la junulo estis "elfosita" el sia kelo. Veninte ree supren en la taglumon, la junulo estis akceptita de ĝentila familio . La junulo trovis la urbon alikonstruita, aliajn stratojn, aliajn placojn ktp. Sed la "elfosita" junulo ankaŭ rimarkis, ke la sociaj aranĝoj, la interhomaj rilatoj estas aliaj ol antaŭe, kiam li estis vivante "entombigita", pliĝuste enkeligita, ĉio en la urbo funkcias ideale. Kio do okazis? En la tempo kiam la junulo estis sube, okazis en la urbo socia revolucio. Inter la junulo kaj lia gastiganto okazas interparoloj kaj la gastiganto rakontas kiamaniere tiu revolucio okazis, kaj je kio konsistas la formo de la nuna homo socio-socialisma kaj laŭ kiuj principoj ĝi funkcias. Tiu utopia rakonto de la dekoka jarcento estas la scienco por fiksi kiamaniere oni devas aranĝi ĉion en la mondo, por ke ĉiuj homoj estu feliĉaj.

Se Juljo Baghy vivus nun kaj se li verkus nun la libron dekomence menciitan, li povus prezenti ankoraŭ specon de Verdaj Don Kiĥotoj. "

Petro.

ooooooooooooooo

<u>Noto de la frakcia sekr.</u>:

Ĉu tiu artikolo spegulas la rezulton de nia frakcia propagando pri abundismo ? Se jes, ĝi estas malesperiga! Ĝi montras, ke ĝia aŭtoro nenion komprenis (eble ne provis kompreni, ĉar li eĉ ne finis la legadon de "Rigardante malantaŭen" , - kiu cetere aperis ne en la dekoka sed en la deknaŭa jarcento).

Tamen ni provos klarigi al li kaj ankaŭ al tiuj, kiuj opinias niajn agadojn utopiaj. Kio estas abundismo ? Kompreneble la vorto "abundo" iom tro grandigas la realon; ĝi devenas de la leĝo de oferto kaj mendo, t.e. : Kiam varo mal<u>abundas</u> sur la merkato, la prezo de tiu varo pliiĝas, kaj kiam varo <u>abundas</u> , ĝia prezo malaltiĝas. Sed vere abundo neniam venus sur la tero se en tuta justeco oni dispartigus la varojn inter ĉiuj homoj. Pri tio la adeptoj de abundo aŭ pli ĝuste de <u>ekonomia egaleco</u> studis la verkojn de pensuloj, kiuj planis novan socion por formalaperigi kiel eble plej la mizeron el la mondo. Tiuj pensuloj estas, laŭ niaj konoj, Jean Silvio Gesell, Ed. Bellamy, Majoro C.H. Douglas, J. Duboin, H. Muller (kaj certe aliaj), kies teoriojn ni priskribis en la diversaj numeroj de nia bulteno (relegu ilin).

Ni rediras, ke se la homaro ne alprenos la ekonomian teorion de Ekonomia Egaleco, la kapitalista ekonomio, bazita sur la kuro al profito sen iu ajn konsidero humana, daŭre okazigos krizojn, militojn kaj fine detruon de la mondo per atombomboj. Kiu ne vidas tion, tiu estas blinda ! Petro ankaŭ demandas: Sed kiu disdonos ? Ŝajnas, ke en demokrata socio la taskoj estas dispartigitaj laŭ ekonomiaj fakoj, la respondeculoj pri distribuado de la varoj disdonos ilin same kiel nun faras la komercistoj. Kiu gardu la maŝinojn ? do, la laboristoj mem. Ĉu do estas mistero en tio ? Petro juĝas nian aferon utopia : Ni bone komprenas, ke jam de pluraj jarcentoj la homoj kutimiĝis obei mastrojn kaj ankoraŭ ne estas sufiĉe evoluintaj por kompreni, ke veraj homoj povos nun esti memstaraj.

La utopio estas konservi la merkatan ekonomion, fonton de veoj.
Kaj la vera socialismo estas bazita sur ekonomia egaleco.
Ni konsilas al Kdo Petro studi antaŭ ol supraĵe juĝi.

Kotro

---

**Jen viaj monsubtenoj de aŭgusto 1971 ĝis aŭgusto 1972 en FF:**

Despeyroux: 7,10 - Kdino Luquet: 5 - Kdino Rougier: 20 - Baudé: 2,22 - Bierhoff: 1,28 - Kotro: 5.
En kaso la 30.7.72: 42,79 FF
Inter ni estas multaj gekamaradoj, kiuj povus helpi nin por aperigi diversaj broŝuroj. Bonvolulo j skribu al ni. Dankon!

---

Ĉiam haveblas ĉe LJP-broŝurserio:

- Alveno de abundo kaj konsumsocio (P.V.Berthier) .... 0, 50 FF
- La Granda Liberiĝo de l'homoj pere de Scienco (Jacques Duboin) .... 1, 00 FF

AL SAT-JUNULARO PARTOPRENANTE SAT-KONGRESON EN KUOPIO.FINNLANDO

Karaj gejunuloj!

sciigo pri: **PROCESO FAR PROKURORO**

Goethe (Gete) diris: "Ne sufiĉas scii, oni ankaŭ devas apliki ĝin, kaj ne sufiĉas voli, oni ankaŭ devas fari ĝin!",
kaj Marks diris: "Ne estas grava kritiki la mondon, sed ĝin ŝanĝi!".

Kaj ĉar Marks kondamnis la profitsistemon, tial li nur povis konkludi: ŝanĝi la mondon per sistemo sen profito.
Kaj Kristo diris: "Esploru ĉion, akceptu la plej bonan, kaj praktiku tion!".
Ĉiuj admonoj estas analogaj al mia postulo: "Montru praktike, kion vi teorie prezentas!".

Ni scias ke mastrumsistemoj (disdonmanieroj) influas la agojn de la homoj, homaro kaj registaroj, kaj la sorton de la homaro. Tial mi prezentis la statuton de nia iama komunumo kiel fundamentan leĝon por Nova Mondo, kaj provas kolekti la homojn, kiuj ne plu akceptas la profitsistemon, la kapitalismon, por ie komenci praktike per la alia sistemo, por ke ĉiu vidu kion ni volas. Mi scias ke ĉefe mi devas provi praktike komenci, tie, kie mi loĝas.
Por atingi tion mi publikigis la fundamentan leĝon por "Nova Germanio". Tion mi sendis al multaj prokuroroj kun la sukceso, ke nun unu prokuroro pritraktos la fundamentan leĝon! Je 18.7.72 mi ricevis tiun komunikon.
Kiam la proceso okazos mi ankoraŭ ne scias, sed nun mi jam havas multan laboron por trovi kiom eble plej da kontraŭuloj de la profitsistemo. Kompreneble mi informos la gazetaron pri ĉi tiu proceso, ĉar nun ja venas la decido: ĉu por, ĉu kontraŭ la profitsistemo!
Espereble baldaŭ venos la decido. Nun du sistemoj batalas unu kontraŭ la alia, pro tio ankaŭ du mondoj.
En 1933 Hitler malpermesis la Novan Leĝon kaj la komunumon, en 1947 la rusa komandantaro en orientgermanio, kaj nun mi scivolegas kion decidos en 1972 la prokuroro.
Bedaŭrinde mi ĝis nun ne sukcesis krei komunuman frakcion en SAT, laŭ la pariza rezolucio; tial mi ne povos diri ke esperantujo laborista sin bazas jam sur nekapitalisma, senprofita sistemo, kio estus pli facila por mi. Sed mi ne timas tiun proceson, mi sopiris al ĝi.

Tion mi skribas al vi, gejunuloj, ĉar mi ne fidas al SAT-estraro informi la kongreson pri ĝi laŭ mia sperto, kaj pro mia financa stato mi ne povas partopreni la kongreson. Tamen mi estas tre feliĉa, ĉar fine venas la tempo, la momento, en kiu ĉiu devas decidi, ĉu li/ŝi estas por aŭ kontraŭ la profitsistemo. Mi nun estas konvinkita, ke ne nur okazos la tria mondmilito, kiu staras antaŭ la pordo.
Eble mi trovos kuraĝulojn, kun kiuj mi intertempe fondos la komunumon en germanio aŭ alie. Neniam pensu ke vi povas ŝanĝi organizon, kiu baziĝas sur profitsistemo.
SE LA KONTRAŬULOJ MEM NE HAVAS LA KURAĜON KOMENCI MASTRUMI LAŬ NEPROFITA SISTEMO, ILI NE ATENDU KE ALIAJ POSEDAS TIUN KURAĜON!!!
Se iu volas ekstermi ian malamikon, li mem ekstermu ĝin; kiu volas ekstermi la profitsistemon, tiu mem ekstermu ĝin, kun s-anoj. Se vi havas volon, vi mem estu laboranta lokomotivo!

Ĉar mi pensas, ke ĉi tiu sciigo ĝojigas vin, mi skribas al vi, kaj poste informos vin pri la evoluo! Bonvolu rakonti al mi vian opinion aŭ vian eventualan decidon.
Intertempe mi salutas vin, kaj deziras al vi sukceson!
Fine ne forgesu: kapitalismo ne estas homo, klaso, raso, partio aŭ registaro, sed disdonmaniero, mastrumsistemo kaj tiun vi nur povas ekstermi per alia disdonmaniero, alia mastrumsistemo, nome ekstermi la profitsistemon per sistemo sen profito!
Ĉiam preta diskuti pri tio,


via Martin Zimmermann

## NUN EBLECO ELEKTI LA SEKSON DE VIAJ INFANOJ

D-ro Landrum B.Shettles, profesoro de Obstetriko kaj Ginekologio ĉe la Kolumbia Kolegio de Kuracistoj kaj Kirurgoj, Nov Jorko, Usono, eltrovis en 1961 metodon kiu povus helpi la homaron elekti la sekson de infanoj.

"Medicina Scienco scias ekde iom da tempo", li diras, "ke estas la viro, kiu estigas la sekson de la infanoj. Se lia fekundiga spermero portas kromosomon X, la infano estos knabino; se ĝi portas kromosomon Y, la infano estos knabo." Bedaŭrinde doktoroj ne povis vide elkovri la diferencon inter viraj kaj inaj spermeroj. Oni nur sciis, ke ekzamenante mortigitajn spermerojn sub ordinara mikroskopo, la kromosomo Y estis pli malgranda ol la X.

Iun vesperon d-ro Shettles decidis ekzameni vivantajn spermĉelojn per faz-kontrasta mikroskopo. Shettles vidis ke la ĉeloj havis malsamajn formojn kaj grandecon. Ekzameninte pli ol 500 specimenojn, d-ro Shettles konvinkiĝis, ke tio dependas de la du seksoj: malgrandaj, rond-kapaj spermeroj portas la virigan kromosomon Y, kaj la pli larĝa, ovala spermĉelo la inigan kromosomon X. Plej ofte la rondaj ĉeloj estas multe pli nombraj ol la ovalaj: du rondaj po unu ovala.




Tuj post kiam li faris tiun unuan eltrovon d-ro Shettles nur pripensis kiel li povus profiti ĝin por helpi al gepatroj elekti la sekson de siaj infanoj.

Li supozis, ke la ina ĉelo (nun nomata ginospermero) devas esti pli fortika ol la vira, ĉar kial estas duoble da virĉeloj (nun konataj kiel androspermeroj) se ne estas por kompensi iun malsuperecon aŭ maleblecon resti vivantaj en medio ekster la vira reprodukt-sistemo?

Por eltrovi, kio minacas la androspermerojn en la vagino kaj utero, d-ro Shettles ekstudis ilian staton je la proksimuma tempo de la ekgravediĝo.

Li plenigis kapilarajn tubojn per sekrecioj de la vagino kaj utero. Tiam li aldonis milionojn da spermeroj tra la truoj de la tuboj, kaj ekzamenis iliajn agojn per la mikroskopo.

Li vidis bildon de spermeroj, similanta ĉevalkonkurskuradon.

Se la sekrecioj en la kapilaraj tuboj estis acidaj (tio estas kelkaj tagoj antaŭ la ovolado) la ginoĉeloj plej ofte venkis. Se la sekrecioj estis alkalaj (tio estas tre proksima al la ovolado), la malgrandaj androĉeloj klare venkis ĉiun fojon.

Acido agas kaj kontraŭ ginoĉeloj, kaj kontraŭ androĉeloj, sed ĝi pli damaĝas la lastajn, ĉar la pligrandeco de la ginospermero protektas ĝin multe pli longe kontraŭ la damaĝo de la acido, kaj ĝi do postvivas la androspermeron.

Alkalaj sekrecioj estas konvenaj kaj bonefikaj al ambaŭ ĉeloj. Tiam en alkala medio montriĝas la avantaĝo de la androĉeloj kompare al la ginoĉeloj; nome: pli granda rapideco dank' al iliaj malgrandaj kapoj kaj pli longaj vostoj kaj precipe ilian plimultnombron.

La medio de la vagino estas kutime acida, kaj tiu de la utero kaj cerviko (pli mallarĝa parto de la utero ĉe ĝia veno en la vagino) kutime alkala. Ju pli proksima al la ovolado, des pli alkalaj la cervikaj sekrecioj de la virino.

Tio do supozigas ke la tempo de la kopulacio estas decida faktoro en la difino de la sekso de la infano. Do, laŭ la studoj de d-ro Shettles, kopulacio dum aŭ tre proksima al la ovolado, kiam la sekrecioj estas plej alkalaj, tre verŝajne estigas virseksan infanon. Male, kopulacio du aŭ tri tagojn antaŭ la ovolado, kiam la medio estas ankoraŭ acida, pli verŝajne rezultigos inan infanon, ĉar la gino-ĉeloj povas resti vivaj la du, tri tagojn ĝis la ovolado, dum la andro-ĉeloj malofte vivas pli ol 24 horojn.

Pluaj studoj. Jam certa ke li estis sur la ĝusta vojo, d-ro Shettles trovis pluajn konfirmojn en raportoj pri artefarita ensemado. Ĉe artefarita ensemado oni klopodas plej ekzakte trafi la tempon de la ovolado por ke la pacientoj estu sukcese gravedigitaj ĉe la unua fojo. D-ro Shettles pensis ke eble flankefiko de tiu metodo estas abunda da vir-infanoj. Li konstatis ke el kelkaj miloj da naskiĝoj pere de artefarita ensemado estis 160 virseksaj po 100 inseksaj infanoj. Alivorte 76% da knabinoj. Do plua konfirmo ke lia teorio estis prava.
D-ro Shettles ankaŭ konstatis ke malmultnombra kvanto da spermeroj ŝajne kondukas al plimulto da inoj. Viroj kun multnombraj spermeroj (natura aŭ post seksa abstino) male tendencas naskigi virseksulojn.

Rezulte de siaj eltrovoj, d-ro Shettles elpensis du metodojn: unu cele al naskiĝo de knabino, alia cele al naskiĝo de knabo.

Por knabino:

1. Ĉesigu seksajn rilatojn dum du aŭ tri tagoj antaŭ la ovolado. Via kuracisto povas diri al vi la ekzaktan tempon.
2. Tuj antaŭ la seksa rilato havu internan vaginan duŝon kun litro da akvo kun du kuleroj da vinagro. La acida duŝo pliigas la ŝancojn havi knabinon, pro tio ke acida medio malhelpas kaj senmovigas la virajn spermerojn.
3. Se la edzino kutime spertas orgasmon, ŝi devas klopodi eviti ĝin, ĉar tio orgasmo pliigas la fluon de la alkalaj sekrecioj.
4. La viro devas malmulte penetri dum la ejakulo. Se la spermeroj estas devigitaj "naĝi" dum longa vojo en la acida vagino ĝis la utero (la fekundigo okazas en la utero aŭ en la tubo inter utero kaj ovario) multaj virspermeroj estos eliminataj.
5. Oftaj seksaj rilatoj ĝis 3 aŭ 2 tagoj antaŭ la ovolado ankaŭ helpas, ĉar tiel malaltiĝas la nombro da spermeroj, kiuj helpas havi knabon.

Por knabo:

1. Seksa rilato celante fekundigo devas okazi kiel eble plej proksima al la momento de ovolado.
2. Tuj antaŭ la seksa rilato havu internan vaginan duŝon kun litro da akvo kun du kuleroj da bak-sodo. Lasu la miksaĵon stari dum 15 minutoj antaŭ la duŝo.
3. La virino ne devas klopodi eviti orgasmon. La orgasmo estu samtempa aŭ antaŭ tiu de la viro.
4. Profunda penetro far la viro helpas ĵeti la spermon proksime al la utero, kio ebligas la virĉel jn atingi la ovolon.
5. Seksa abstino estas necesa. Evitu kopulacion ekde la komenciĝo de la menstrua ciklo ĝis la tago de la ovolado. Ĉi tio certigas la plej grandan kvanton da spermo, kio estas faktoro helpante la androĉelojn.

Rezultoj. D-ro Shttles raportas ke el grupo de 22 paroj da pacientoj, kiuj deziris havi knabinon, 19 sukcese havis knabinon (anstataŭ normale 11). El 26 paroj kiuj deziris knabon, 23 (anstataŭ normale 13) akiris knabon.
La metodo de d-ro Shettles ne estas 100% efika, sed tre proksima.
Por la unua fojo en la homa historio, ni povos fari vere laŭsciencan klopodon decidi la sekson de niaj infanoj.
D-ro Shettles klarigas ke ne pravas tiuj, kiuj timas ke lia metodo povos okazigi grandan problemon en la mondo pro la prefero je knaboj. D-ro Shettles diras ke tra la jaroj gepatroj nepre deziras havi "ekvilibran familion", t.e. tiom da knaboj kiom da knabinoj.
Laŭ d-ro Shettles la granda problemo en la mondo estas la popol-eksplodo, aŭ hom-eksplodo. Kiam geedzoj havas nur ekz. knabojn; 3, 4, 5, ili daŭre naskas

# PRI LA MALPURIGADO-!

La subaj tri eltiraĵoj el diversaj danaj libroj klarigas la internan malpurigadon de la homa organismo.


D-ro med. Robert Bell:

Malforto, suferoj kaj malsano aperas, ĉar la histoj ricevis nutraĵon el detruita, delikata manĝaĵo, anstataŭ forton el la vivodonanta, natura nutraĵo. Mi ne postulas, ke oni devas ŝanĝi al tute samspeca nutrado. Sed mi opinias, ke granda parto el nia manĝaĵo devas konsisti el nutraĵo en tiu preciza formo en kiu la naturo donas ĝin al ni.
La homo estas la sola kreaĵo, kiu detruas sian nutraĵon, antaŭ ol ĝi manĝas ĝin. Per varmo-pritraktado malaperas ĝis 2/3 de la natura nutro-valoro. Kaj kiam fruktoj aŭ legomoj pere de la kuiro perdas siajn vitalajn valorojn, kaj kiam ĝiaj kemiaj kombinaĵoj tute ŝanĝiĝas, tiam ili ne plu estas nutraĵo, kiu akcelas sanan vivon de la ĉela histo. Ĝi fariĝas morta viando. Sana korpo, ekvilibra kaj aktiva spirito, fizika, eltena kapablo, liberigo de malsano kaj feliĉa maljuneco povas esti atingata pere de natura dieto - kunigita kun plenumo de la higienaj reguloj.
Niaj medicinaj kandidatoj estas elsendataj, por ke ili praktiku inter ni, tute ne konataj kun tiuj ĉi tiel vitalaj kaj gravaj scioj: kiom la nutrado povas kaŭzi al ni malsanon aŭ doni al ni sanecon, la antaŭgardaj kaj sanigaj ecoj de la natura nutraĵo. Nun, ni devas havi sufiĉan pruvon, ke la dieto estas tre grava faktoro kaj pri la estiĝo de la malsano kaj pri ĝia malapero. La vero estas tia, ke ne estas loko por malsano en sana organo. Per aliaj vortoj, ĝi estas memgardanta. Kaj mi atendas tiun tagon, kiam nomiĝo de profesoro en dieto- kaj nutrajo-demandoj same validas kiel alia profesoreco.
Ankaŭ krome ke la praktikado de la medicina laboro estonte ĉefe estos la praktikado de la dieto. "Vis medicatrix naturae" - la kuracanta potenco de la naturo.
Nenatura dieto, tro da nutraĵo kaj la kronika konstipo de la dikintesto kaŭzas venenadon de nia sistemo. Tio estas la plej agema faktoro en la evoluo de la kancero.

D-ro Brunton:

en "Dietsistemo kaj diet-etiko", London 1906, paĝo 13:
Pro tio, ke kuiro estas tiel ĝenerala kaj la malmolaj partoj de la nutraĵo - kiuj devus esti mekanika stimuliloj por la intestoj - fariĝas molaj kaj perdas sian mildan, stimulan efikon, kaŭzas ke la fekaĵo konstante fariĝas pli inerta, kaj la civilizita homaro ĉiam estas pelata en la staton de la konstipo. La digest-kanalo ne nur estas absorba organo, ĝi ankaŭ diferencigas, kaj multaj el la ŝtofoj absolute devas esti forigataj. Se tio ne okazas, ili estas absorbigataj de la organismo kaj kaŭzas malstreĉiĝon, malagrablecon kaj fine detruitan sanstaton. Tial la nutraĵo devas enhavi semojn, branon aŭ vegetaraĵojn, fibrojn.
Laksigaj medikamentoj nur estas necesaj ĉar la homo vivas nenature per longe kuiritaj, molaj nutraĵoj, kiuj estas senigitaj de ĉiuj naturaj, stimulaj substancoj.
Ni venenas nian korpon tute ne necese, parte pro emo al manĝaĵo, parte pro emo al komforto aŭ pro konvenciaj kaŭzoj, kiuj detruas nian sanon. Inter la lastaj estas antaŭ ĉio nia maloportuna timemo kaj indiferenteco rilate al la malplenigo de la intesto.

KONSTIPO?
pilolo, ---NE!
krudoj manĝaĵoj----
JES



****************************************

(daŭrigo de la antaŭa paĝo)

infanojn, ĝis kiam knabino alvenas.
La samaj geedzoj, diras prave d-ro Shettles, havante unu knabon kaj unu knabinon, verŝajne ne dezirus havi pluajn.
Lia metodo do, povus helpi solvi la grandan mondan problemon de la plimultiĝo de la loĝantaro.

(daŭrigo de "Pri la Malpurigado")

Por ke oni povu kontraŭbatali kanceron sukcese, ĉiu sola - organizoj de ĉiu speco kaj la publikaj aŭtoritatoj devas kune labori.
Specialaj antaŭjuĝoj devas esti venkitaj, krome aperas tre potencaj kapitalistaj interesoj en la demando.

Hans Boringvad:

"La nutrad-arto": La kuirita planto rapide dissolviĝas, same kiel kadavro rapide putriĝas. La homoj ankaŭ putriĝas, se ili manĝas tiajn kadavrojn, kiuj nur povas servi al mekanika hejtajo. La organa, vivanta planto nutras niajn nervojn per sia elektra vivo, kontraŭe, la mortkuirita planto - kaj ĉio tiel pritraktata nutraĵo entute - anstataŭe pere de sia kadavra brulado en ni, konsumas kaj elsuĉas nian denaskan, rezervan forton.
Per la morta tablo-salo ni klopodas gustigi tiun sengustan substancon, kiu fariĝas la rezulto, kiam la organaj saloj kiel tiaj perdiĝas dum la kuiro.

esperantigis: Betty Larsen

" " " " " " " " " " " " " .

## SEMAJNFINO 16/17an de SEPTEMBRO '72a

Kun granda plezuro la distrikta estraro (Nord-Holando de F.L.E.) povas komuniki ke ĝi sukcesis denove aranĝi semajnfinon en la naturamika domo "De Banjaert" en Wijk aan Zee. Ĝi okazos la 16an/17an de sept.'72a.
Ni esperas ke ankaŭ ĉi tiun fojon ni povos saluti geamikojn el aliaj provincoj kaj eĉ el aliaj landoj kiel la lastajn fojojn. Membroj, kiuj ĝis nun ne partoprenis semajnfinon, havas nun la eblecon konatiĝi kun la agrabla etoso, kiu ĉiam regas en niaj renkontiĝoj. Ankaŭ la familianoj kaj infanoj, kvankam ne ĉiam parolantaj Esperanton, ŝatas la renkontiĝon kaj samtempe spertas la agrablan etoson inter geesperantistoj.
Ni kantas, ludas, promenas, diskutas kaj havas multe da plezuro. Kunportu "Ni Kantu" kaj la naturamikoj la "NIVON"-ateston.
Vi jam nun povas anonci vin ĉe la kasistino de la distrikto:
S-ino A.Kwantes, Marnixstraat 57,
Haarlem 1506, Nederlando,
Tel: 023 - 265417

La kostoj por la tuta semajnfino estas 12.50gld. NIVON-membroj ĝuas rabaton.
Ĝirkonto de la kasistino: 116430,
nome de: penningmeester Bond van Arbeiders Esperantisten, distrikt Noord-Holland, Marnixstraat 57, Haarlem1506
Tiuj, kiuj vizitis la SAT-kongreson, en Kuopio, havas samtempe la okazon montri la diapozitivojn, fotojn kaj interŝanĝi la diversajn travivaĵojn
La distrikta estraro esperas ke multaj denove trovos la vojon al la naturamika domo "De Banjaert en Wijk aan Zee. Por atingi Wijk aan Zee, vi prenu la vagonaron al Beverwijk kaj tie antaŭ la stacidomo la aŭtobuson al Wijk aan Zee.

Rob Kwantes,sekr.

"de banjaert"

## legita:
******************

S-ro Mansholt en sia kvalito de prezidanto de la Komisiono de Eŭropa Komunumo defendis la uzon de nuklea energio.
Li ignoras la danĝeron de la vivo minacanta venenado per radioaktiva materialo de Rijndelto kaj atentigas pri la sekura konservado de la nuklea materialo en specialaj ujoj.
-- kiuj montriĝos netaŭgaj nur post la morto de Mansholt

* * *

Aliancano Usono zorge vartas sian infanon Eŭropo. Senorde diskuŝas sekretaj dokumentoj en kiuj estas legeblaj ke en kazo de milito la senfoliigado de la eŭropaj arbaroj rezultos en kelktaga kontraŭstaro de la malamiko.
-- Liberigu nin de niaj amikoj, niajn malamikojn ni mem venkos

* * *

Ĉe konferenco de kvin arabaj respublikoj kun sep okcidentaj olerafinentreprenoj Irano ne ĉeestis. Tiu lando estas konsiderata nelojala, ĉar la ŝaho rezignis pri sia profitparto en la olerafinentreprenoj (ĉefe Uson-Britaj) kaj krome pri kontrolo de iliaj agoj.
-- La ŝaho bezonas la apogon de Usono por sia diktatora regado

-/-/-/-/-/-/-/-/-/-/-/-/-/-/-/-/-/-/-/-